

INTERLANGUAGE



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

## AMERIKO

*"Lando de libereco, lando  
de estonteco, mi vin salutas!  
Lando, pri kiu revis kaj nun  
ankoraŭ revas multaj suferant-  
oj kaj senkulpaj persekutitoj,  
mi vin salutas! Mi klinas min  
antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa,  
ke la sorto permesis al mi, vin  
vidi, kaj spiri almenaŭ dum  
kelka tempo vian liberan, de  
neniu monopoligitan aeron."*

L. L. Zamenhof

## AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la  
ESPERANTO-ASOCIO  
de NORD-AMERIKO*

**JULY-AUG, 1952**

*Thirty-five Cents*

## AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

114 West 16th Street

New York 11

N. Y.

Vol. 66

Nos. 7-8

*Associate Editors:* Dr. William Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. Norman McQuown, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Myron R. Mychajliw.

*Sustaining Board:* Portia Anderson, Dr. Luella K. Beecher, John M. Brewer, Sergio Docal, Preston Davis, Jr., Ernest G. Dodge, Harold Ewen, Dr. G. P. Ferree, Dr. F. W. Breth, George Hirsch, H. F. Keller, Tony Nabby, R. C. Palmer, Russell Rausch, D. B. Richardson, Douglas Scott, Mazah Schulz, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Dr. William Solzbacher, Francis H. Sumner, Adeline Vigelis, Flora Wyman, Anonymous.

*Office Assistants:* Lola Mae Muse, H. S. Harris.

### Peer Gynt

By HENRIK IBSEN



*This masterpiece of Norwegian literature is now available in Esperanto. A story in poetic form of wild adventure, impulsive love, filled with delightful scenes from Norwegian country life. The Esperanto translation is beautifully done, retaining the flavor and power of the Norsk original. The verses flow smoothly, making for ease and clarity in reading. (Included in the book are three additional Norwegian folk tales.)*

*Beautifully bound, \$2.30 postpaid.*

*Enjoy this masterpiece of world literature today! Order from:*

**Esperanto Book Service of America**  
114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

*Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.*  
Make Checks Payable to Esperanto Association of North America

Active Membership in E.A.N.A. — \$5.00 per Year

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 66

JULY-AUGUST 1952

Nos. 7-8

## MR. TRYGVE LIE IS A FRIEND OF ESPERANTO

THE Esperanto Association of North America was represented at the Universal Esperanto Congress in Oslo by Dr. F. W. Breth who addressed the meeting as follows:

"I have the honor of representing the American Esperantists at this Congress and to bring you their greetings. It is to be regretted that in our great country there are not many Esperantists; this is because English speaking people do not consider it necessary to learn an auxiliary language. We are working hard to change this viewpoint.

"Nowhere can one feel the necessity of a common language more than at the United Nations, whose sessions take place in our city. To listen to speeches with the help of an earphone is a primitive method which greatly hinders the understanding of the members of the United Nations. We hope that in the not too distant future the wise men who from all over the world come to take part in that forum, will see the light and accept Esperanto as one of the official languages. To accomplish this is the most important task of our group."

With these words still ringing in his ears, our delegate considered it almost fateful when on his flight from Stockholm to New York he saw Mr. Trygve Lie, the Secretary-General of the United Nations, boarding the aeroplane in Oslo. Here was a rare opportunity to put in a good word for our cause. Mr. Lie is undoubtedly the most prominent Norwegian living today, but like all great men he is friendly and when our delegate asked for permission to speak to him, Mr. Lie readily consented. Dr. Breth pointed to his *Verda Stelo* (green star emblem) and said to Mr. Lie, "That is the subject upon which I wish to speak." Mr. Lie immediately recognised the emblem and said that he was well informed about Esperanto. It is an idea capable of bringing nations closer together and therefore it has his full sympathy. When our delegate asked what the chances are of the United Nations adopting Esperanto, Mr. Lie answered that we have to be patient; humanity is slow in accepting new ideas. He personally favors it not only as the Secretary-General of the United Nations but also as a Norwegian.

Mr. Lie is a statesman and as such has to express his opinions guardedly, but the fact that he is in sympathy with our movement should be an inspiration to us.

---

*Permission for the publication of the above article was received from the Secretary-General's office as follows: "The Secretary-General has asked me to acknowledge receipt of your letter dated August 26th. Mr. Lie has read the article which you intend to publish in the 'American Esperantist' and takes pleasure in informing you that he has no objection to its publication."*

## ESPERANTO IN ACTION

AROUND THE WORLD

**On behalf of the United Nations** its Assistant Secretary-General *Mr. Benjamin Cohen*, and *Mr. Lin Mousheng* of the Division of Human Rights, thanked *Dr. William Solzbacher*, President of the Esperanto Association of North America, for transmitting to the U.N. copies of the Universal Declaration of Human Rights in Esperanto, for use by school children. Based in part on the complete Esperanto text of the Declaration, first published in the *American Esperanto Magazine*, the simplified version was printed in France for the International League of Esperanto Teachers. It is similar to a simplified text used in the schools of the Philippines and was prepared by *Miss T.K. Slade* and several of her colleagues of the Society of British Esperanto Teachers.

**The President** of the Brazilian Government Institute of Geography and Statistics, *General Djalma Polli Coelbo*, recently distributed diplomas to eight employees of the Institute who had completed an Esperanto course. Esperanto is the official language of the Institute for its foreign relations.

**The mayors of all French cities and towns** recently received a letter from the mayor of Lourdes, requesting them to answer a questionnaire about Esperanto. Would they welcome the general adoption of the language? Would they support a bill making Esperanto classes compulsory in all schools, beginning with the teachers' colleges? The answers have not yet been tabulated.

**"Education"**, published in Boston as a magazine "devoted to the science, art, philosophy and literature of education", brought out a Modern Language Number in June 1952 and included in it a seven-page article, "People Must Speak to People", by *Mark Starr*, Educational Director of the International Ladies' Garment Workers' Union and a member of the U.S. Delegation to the London UNESCO Conference in 1945. Mr. Starr in this article makes a strong case for Esperanto, pointing out its practical, literary, and educational value, and, above all, its role in building international understanding and friendship by direct people-to-people intercourse.

**The "Spiritual Exercises" of St. Ignatius Loyola**, a famous book written by the founder of the Jesuit Order 430 years ago, recently appeared in an Esperanto translation at Valencia, Spain.

**The President of the worldwide Buddhist Esperanto League**, *Rudolf Petri*, of Sweden, has been invited by Japanese Buddhists to lecture in their country. He plans to visit many countries and to lecture everywhere on Buddhism and Esperanto.

*In the Netherlands*, Esperanto was taught during the past school year in 20 schools and colleges. 754 students attended classes. The figures include seven teachers colleges at which 288 students learned Esperanto. According to the "Esperanto in the Schools" organization, the figures are incomplete because several institutions at which Esperanto is believed to be taught failed to return the questionnaire. In four Dutch schools, attendance at Esperanto classes is compulsory.

*The Lady Mayoress of Newcastle-on-Tyne* spoke Esperanto as well as English when she welcomed the 36th British Esperanto Congress to her city. Mrs. V. H. Grantham is the first woman to be elected chief executive of this northern English city.

*In Athens, Greece*, approximately 2,000 high school and college students registered for Esperanto classes.

*Esperanto summaries* recently appeared in two scientific publications in Scandinavia. One is a report about the zoological results of a Swedish Antarctic Expedition, the other a report of the Phytopathological Laboratory J. E. Olsons Enke in Copenhagen.

*450 Esperanto-speaking railroad employees* from 11 countries recently attended an Esperanto Conference at Lindau on Lake Constance, Germany, near the Swiss, French, and Austrian borders. The German, French, Austrian and Norwegian Railroads were officially represented.

*At the Eucharistic World Congress in Barcelona*, Spain, an Esperanto Conference was held last May. Archbishop Paul Yu-Pin of Nanking, China, who had been one of the principal speakers at the first Eucharistic Esperanto Conference, held at Budapest, Hungary, in 1938, said Mass at the Conference. The Reverend A. Beckers, of Belgium, President of the International Catholic Esperanto Federation (IKUE), preached a sermon in Esperanto. Catholic members of the Esperanto movement from Andorra, Argentina, Austria, Belgium, Germany, Great Britain, Ireland, the Netherlands, and Spain were present. Announcements concerning the Eucharistic Congress were made over Radio-Barcelona in Esperanto.

*In Argentina*, one of the speakers at the Sixth National Esperanto Conference, at La Plata, was the Very Reverend Dr. J. B. Se-Tsien Kao, who recently arrived by air from Hongkong via New York. This well-known Chinese scholar has lectured in and about Esperanto all over the world, especially in North and South America.

*In New Zealand*, the Workers' Educational Association of Auckland recently organized an Esperanto class which attracted so much attention that 59 persons registered. This was due in part to the fact that the teacher, Dr. Janos Hamvai, a displaced person from Hungary, came to New Zealand only recently and knows only a little English. He uses the popular Cseh method according to which teacher and students converse in Esperanto from the very beginning.

*The recent International Trade Fairs* of Lyon and Angers, France, and Padova, Italy, successfully used Esperanto in their publicity and in their services to customers from abroad.

## AMERICA AND THE LANGUAGE PROBLEM

*An extract from the address which Dr. William Solzbacher, President of EANA, delivered June 28, 1952, at the 42nd Annual Congress of our Association at Sacramento, California.*

**E**ARL J. McGRATH, United States Commissioner of Education, made a significant speech on "Language Study and World Affairs" at the 35th Annual Meeting of the Central States Modern Language Teachers Association, at St. Louis, Mo., May 3, 1952.

The Commissioner drew a vivid picture of what happens frequently at international conferences: "In a recent international meeting on education the delegate from Egypt rose and addressed the audience in faultless English. The next day with equal fluency and precision he used French, the other official conference language. In private conversation with the representative from Western Germany he spoke the latter's language. And, of course, he was master of Arabic, his own tongue. Though the educators from some forty other nations were linguistically less versatile than he, most of them could use at least one tongue in addition to their own with ease and exactness.

"At this conference the United States was represented by five persons all of whom had no less than 19 years of formal schooling, and all of whom held the Ph.D. degree. Yet no one of them could use another language well enough to carry on even a private conversation fluently, to say nothing of addressing the conference formally from the floor. This is not an unusual situation. Americans who travel in other lands are quickly impressed with the ability of other nationals to understand and to speak several languages. They are also keenly aware of and often embarrassed by their own inadequacies in this respect..."

Mr. McGrath pointed out the linguistic aspects of America's role as a world power: "For the average citizen the basic consideration in a discussion of language study today is our world position as a nation. Our leadership in the U.N., our efforts through the NATO to join free nations in resisting totalitarian aggression, our intellectual and cultural activities in connection with UNESCO, our technical assistance under Point 4 and the Mutual Security Agency, our work in the Organization of American States, our Fulbright program for the exchange of teachers and students — all these activities and a host of others make our position of international responsibility and leadership abundantly clear. These international involvements, combined with the development of rapid telephone and radio communication and rapid transportation by air, now place us politically, physically, and socially closer to the Egyptians than Frenchmen were to Norwegians only a few years ago. The activities of our national and personal lives affect, and are affected by, people in the far corners of the globe.

*"Whether we discharge our world responsibilities well or poorly, foolishly or wisely, ignorantly or understandingly, will be determined by our ability to understand other peoples and their ability to understand us. However valuable our military and foreign assistance programs may be, and I would be the first to attest their worth, our world position and the*

future of democracy in the decades ahead will not be determined by our military power, nor by our generous financial and economic assistance to other peoples. Some actually fear our power. Others fear dependency. Both of these attitudes make difficult the achieving of affirmative mutual relationships. Our own long term leadership must rest on firmer grounds than military and other forms of material assistance. The late Dr. Bennett, Director of the Point Four Program, once said that we could not succeed in uniting the free nations around the banner of democracy except as we can convince those who differ from us in culture, color, and creed, that we understand and respect them.

"One of the traditional arguments of the advocates of foreign language study is pertinent in this connection. Only through the ability to use another language even modestly can one really become conscious of the full meaning of being a member of another nationality or cultural group. It is in our national interest to give as many of our citizens as possible the opportunity to gain these cultural insights. . ."

The Commissioner of Education then presented his ideas about beginning language teaching in the elementary grades and making it more "functional". He concluded: "The U.S. is, whether we like it or not, in a position of world leadership. If it is to discharge its obligations wisely and well, our citizens must understand other peoples and other cultures. To gain such understanding, many Americans must command a knowledge of one or more foreign languages. If they are to acquire these language skills, our school system must provide opportunity, beginning in the early grades, for many children to study other tongues. It is in the national interest for members of the profession and laymen to unite their energies in an effort to increase the study of foreign language among our people. In doing this, I firmly believe they will be making a vital contribution to the well-being of our people, to our national prosperity, and to international understanding and peace."

One of the replies to a general request of the Commissioner of Education for suggestions and comments came from Elizabethtown College, Elizabethtown, Pa., where Esperanto is taught. Dr. F. C. Neumann, Chairman of the Department of Languages, pointed out that many of the aims so eloquently presented by Mr. McGrath can be obtained by promoting the study of Esperanto. "Our world," Dr. Neumann wrote, "speaks in hundreds of languages. This problem cannot be solved by a knowledge of two or three languages. The problem is of a universal nature and can be solved only by a universal language: Esperanto. . . In my college, students flock to the course because Esperanto is by far easier, more concise, and more precise than any other language I know. With its genial simplicity and its reduction of grammar to 16 rules, Esperanto is destined to conquer the world if this world follows the laws of logic."


There is no better and more effective way of enabling people to speak to people elsewhere on a basis of linguistic equality than to spread the knowledge and the practical use of Esperanto. More than six hundred schools and colleges throughout the world teach Esperanto now. A great effort should be made to increase this number, and it is very desirable, and even essential, that the United States should do a great deal more in this respect than it has done in the past. Let us all work towards this goal.



**42nd Esperanto Congress, Sacramento, California:** *Left to right, 1st row:* Rev. A. L. Anderson, Ida Belle Craig, Eulalia Marks, Dr. W. Solzbacher, Adeline Vigelis, C. K. Sutcliffe, Celia Winnick, H. S. Cortett; *2nd row:* H. L. Thompson, Cora Cooley, Maud Kall, Senator H. E. Dillinger, Elise Lippmann, G. Alan Connor, Doris T. Connor, Germaine Chomette, A. S. Vinzent; *3rd row:* Konrad Kall, Clara Olsberg, Cecelia Thomas, Gilbert Nickel, Joseph Scherer, Blanche Parker, Margery Williams, Patricia DeCleene, H. E. Reed, M. Demrick, C. Chomette, J. E. Cooney, M. Baade, Bertha Helmer.







★ ★ ★ THE EDITOR'S DESK

*EANA is the representative, organized body...*

The Esperanto Association of North America is at this time the representative, organized body of the Esperanto movement on this continent. An attempt is now being made to organize another association by a committee of a few persons who are dissatisfied ... With a few exceptions, these leaders are persons of nervous temperament, anxious to see things move along in the way they want them to go. When they do not move in this way, they naturally want to know what and who is at fault. They seek something to blame...

Another type of person discovers that the trouble lies in the working organization of the Esperanto movement. He feels that if *he* were secretary, if *he* were president, this impatient desire to see things go just right, would translate itself into material terms, and all would be lovely...

One member of the "committee" which in its impatience wants to remedy human nature by making a new organization of Esperantists, recently wrote me that if *he* were in charge of this magazine, he could get nine-tenths of our subscribers to renew, and could get ten new ones in place of the tenth who dropped out. The man who can bend human nature into conformity with such a wild boast, would, had he lived in military days, have had Napoleon as a stable boy; Alexander the Great would have felt himself honored to sew buttons on the pajamas of such a genius...

The attempt to establish another organization is to set the Esperantists at cross purposes among themselves and make them ridiculous in the eyes of the public... "Lo," say the irreverent papers, "see the funny folks who seek to make the world of one speech. They ask a billion people to unite on a grammar, but even a few hundred of them cannot agree among themselves."

It may be instructive to our members to note that the above article was not written by your present Secretary-Editor, but by a former Secretary-Editor, *Arthur Brooks Baker*, more than 42 years ago (and 35 years before *G. Alan Connor* was elected to this office). The article is as timely today as it was then. *Always* there are a few personally ambitious and/or extremely radical individuals who seek to misuse the organized membership in the interests of their irresponsible "committees", "institutes", "foundations", etc. Dozens of these campaigns of falsehood and calumny have come and gone through the years. *Ignore them.* Look to your official and responsible *EANA* for all your Esperanto services. The solution to the problem of unified effort for *Esperanto in America* is as simple as that!

# The Esperanto Association of North America

## GRENERO AL GRENERO FARIĜAS GRANDA AFERO



*Nova membro de la Subtena Komitato:* Kun plezuro ni bonvenigas S-ron Sergio Docal, kiel membron de la Subtena Komitato de EANA. S-ro Docal kontribuis \$120 al EANA el dankemo pro helpo, fare de la Centra Oficejo, pri retrovo de multvaloraj foto-aparatoj, kiujn ŝtelistoj elprenis el lia aŭtomobilo. Kvankam la Centra Oficejo nur deziris helpi bonan membron laŭeble en tia okazo, S-ro Docal insistis, ke tia helpo estis eksterordinara kaj li faris tre helpeman kontribuon al EANA. Ni sincere dankas lin.



*Kontribuoj al la Subtena Kaso:* Ni sincere dankas la sekvantajn membrojn, kiuj sendis siajn helpajn donacojn (ricevitajn depost la Majo-Junia numero de AE) por subteni la Asocion: Van Allen Lyman (5)\$, M. Chrenka (\$3.20), Geo. Fairbairn (\$1.75), R. H. Williams (\$1.10), R. Fox, J. A. Jarvis, Allan Hutcheon, Andrew I. Rogus, Fay Varisco, Eugene Middleton, Rev. E. B. Williams.

*"Amerika Esperantisto" en Publikaj Bibliotekoj:* Koran dankon al la sekvantaj membroj pro iliaj donacabonoj de AE: Esperanto-Klubo de Los Angeles (10), A. I. Rogus (3), W. P. Vathis (2).

*Sukcesojn en la kampanjo "Ciu Membro Varbu Unu Novan Membron"* havis la sekvantaj: M. Villareal (1), D-ro W. Solzbacher (1), Donald Jones (2), Rev. R. Mason (1), O. Telizyn (1), D-ro F. C. Neumann (1), D. Therrien (1), R. Vineski (1), D-ro G. Maggio (1), W. D. Hackett (1), Peter Greve (1), C. R. MacDonald (1). Koran gratulon kaj dankon!

## BIG PROMOTION CAMPAIGN WITH "PGL" AT ONLY ONE CENT

*"Eĉ guto malgranda, konstante fraŭpante, traboras la monton granitan."*

NOW, at the beginning of a new season for the promotion of Esperanto, there is great opportunity and need for making America Esperanto-conscious. Intelligent men and women are more and more inclined to accept Esperanto as a vital instrumentality for world communication and understanding. Note the friendly attitude of the Secretary-General of the United Nations in this issue – and there are many others.

But, in all earnestness we must point out the increasing public relations activity of IALA and other projects, which tends to sow confusion in the public mind. We have in our PGL Booklet an excellent means for combating this insidious propaganda against the living interlanguage Esperanto. Let's take Zamenhof's admonition literally: "Ni semas kaj semas, neniam laciĝas, – ni semas kaj semas konstante." Let's unite in a great campaign of sowing the PGL among important people everywhere.

Every member can help demonstrate to our public leaders (educators, ministers, business men, etc.) that Esperanto is the vital going-concern in interlanguage. To encourage wholesale use of the PGL for this tremendously important purpose, EANA will send the PGL to you at half-price, 1¢ each, and postpaid. Use the circular in this issue of AE.


## MONDVOJAĜO PER ESPERANTO KAJ LA DIKFINGRO

Jen foto de *Patricia DeCleene*, kiu vojaĝis tra 29 landoj per la internacia lingvo kaj la internacia dikfingro! Ŝi havas 45 jarojn kaj estas avino, sed ŝi mirinde sukcesis viziti multajn landojn per senpaga veturado en aŭtomobiloj.

De sia hejmo en Nov-Zelando, S-ino DeCleene veturis per ŝipo al Egiptujo, de kie ŝi veturis tra Nord-Afriko kaj Eŭropo uzante la dikfingron. Ŝi vizitis multajn Esperanto-klubojn kaj kongresojn.

Kun deziro ĉeesti la EANA-kongreson en Kalifornio, survoje hejmen al Nov-Zelando, ŝi venis per ŝipo al Nov-Jorko de kie ŝi 'dikfingris' trans la kontinenton al Sakramento. Dum la kongreso ŝi faris tre interesan kaj ĉarman paroladon pri siaj dikfingro-spertoj.

Post la kongreso ŝi vizitis la pacifikan marbordon, kaj poste iris al Kanado, de kie ŝi intencis enŝipiĝi por la vojaĝo hejmen al Nov-Zelando. Ĉiuj Esperantistoj en Usono kaj Kanado deziras por ŝi bonvojaĝon.



### EN KIU LINGVO PENSAS VI?

Jen kelkaj interesaj respondoj al la demando en antaŭa numero de *AE*:

"Ŝajnas al mi, ke la plimulto da homoj pensas senlingve. Sed kiam la homo esprimas siajn pensojn al alia homo, tiam li siajn pensojn esprimas vorte en tiu lingvo kiun li scipovas aŭ kiun komprenas lia aŭskultanto... Homoj surdmutiloj, kiuj ne povas paroli, ankaŭ pensas kiel ĉiuj aliaj senlingve." — *A. Klimas, Ohio*.

"Kiel scii? Kompreneble estas la angla vorto, kiu venas pliofte al mia menso aŭ lango, sed ne ĉiam. Okaze la franca, la germana, aŭ la Esperanta vorto unue eksaltas al la langpinto, sed ĉu tio estas pruvo, ke oni pensas tiulingve? Ŝajnas al mi, ke ne. Oni povas pensi sen paroli, ofte oni parolas sen pensi!" — *D-ro P. L. Pratley, Kanado*.

"Mi estas certa, ke oni pensas en la lingvo en kiu oni parolas, kondiĉe ke oni bone scias tiun lingvon. Kiam mi parolas angle mi pensas en ĝi, ĉar tiu lingvo estas mia ĉiutaga lingvo kaj mi bone scias ĝin. Kiam mi parolas Esperanton mi ankaŭ pensas en ĝi, ĉar mi sufiĉe scias ĝin. Tamen, se oni ne bone scias lingvon estas tre malfacile pensi en ĝi." — *D-ro Lehman Wendell, Minesoto*.

## LA EVOLUO DE ESPERANTO KAJ LA AKADEMIO

*D-ro William Solzbacher*

*Membro de la Akademio de Esperanto*

**L**A Akademio de Esperanto oficialigis la sufikson *-end-* kun la difino: "kiu devas esti *-ata* pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata *-i*". Estonte do ne plu estos neologismoj frazoj kiaj "la tasko estas fareda", "la regulo estas forigenda" aŭ "la libro estas legenda". (Atentu tamen! La lasta frazo estas dubesenca.)

La decido pri la nova sufikso altiras atenton al la rolo, kiun la Akademio ludas en la evoluo kaj progreso de Esperanto. Oni ofte aŭdas la kritikon, ke ĝi "funkcias malbone", ke ĝi "ne estas sufiĉe aktiva" kaj ke ĝi "estas tro konservativa".

En la voĉdono pri *-end-* partoprenis 40 Akademianoj. 22 voĉdonis por la oficialigo kun la proponita difino; du voĉdonis por la oficialigo, sed ne akceptis la difinon; 16 voĉdonis kontraŭ la oficialigo. La tri usonaj Akademianoj "disfalis" en tri grupojn: S-ro Scherer voĉdonis "jes", D-ro Lippmann akceptis la oficialigon, sed ne la difinon, kaj mi voĉdonis "ne".

La kaŭzo de mia ago ne estis principa kontraŭstaro kontraŭ *-end-*, sed la opinio, ke plua studado de la problemo estas dezirinda kaj ke la afero ne estas urĝa. Kompreneble mi nun volonte akceptas la decidon de la plimulto.

Dum la 47 jaroj de la ekzisto de niaj lingvaj institucioj, la Lingva Komitato kaj Akademio (nun nur plu ekzistas la Akademio) oficialigis nur unu prefikson kaj tri sufiksojn: *-ac-* en 1910, *-ism-* en 1914, *-mis-* en 1929, *-end-* en 1952. Krome la Lingva Komitato akceptis 6 Aldonojn al la Oficiala Vortaro, oficialigante proksimume 1500 radikojn. Ĉar la Oficiala Vortaro enhavas proksimume 2800 radikojn, la tuta nombro de oficialaj radikoj en Esperanto nun estas proksimume 4300.

Multaj Esperantistoj riproĉas al la Akademio, ke ĝi "ne multe faras", ke ĝi oficialigas radikojn "tro malfrue" kaj ke ĝi "ne zorgas pri la pliriĉigado de la lingvo". Ili atentigas, ke la lingvo daŭre kreskas per la apero de novaj vortoj en libroj kaj gazetoj, kaj diras, ke la Akademio devus rapide sankcii aŭ malpermesi ilian uzadon.

Oni povas respondi, ke en la nuna tempo estas preferinde, ke la Akademio faru tro malmulte, ol ke ĝi faru tro multe, ĉar stabileco estas pli grava ol daŭra kreskado. Kelkaj Esperantistoj emas troigi la "enpenetron de neologismoj en praktikan uzon". Se unu aŭ du verkistoj uzas neologismon en siaj libroj aŭ se du aŭ tri gazetoj uzadas ĝin, tio tute ne sufiĉas por pruvi ĝian ekzistorajton. Eĉ se preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj akceptus iun radikon, oni ankoraŭ povus esti hezitema.

Laŭ bone konata diro de Edmond Privat, Esperanto estas "vivanta lingvo de vivanta popolo". Tio estas vera – sed ne tute. Esperanto estas vivanta lingvo por kelkaj homoj, dormanta aŭ duone dormanta lingvo por aliaj. Permesu al mi klarigi tion.

Nur malgranda parto de la personoj, kiuj lernis Esperanton, uzas la lingvon konstante. Esperantistoj, kiuj uzas Esperanton ĉiutage, abonas pli ol unu Esperanto-gazeton, aĉetas kaj regule legas la plej gravajn

nove aperantajn librojn, ne estas multnombraj. Ni diru, ke tiu kategorio konsistas el 10,000 personoj.

Pli multnombraj estas tiuj, kiuj iom partoprenas en la organizita Esperanto-movado, legas almenaŭ unu Esperanto-gazeton regule kaj Esperanto-librojn de tempo al tempo. Ni supozu, ke ilia nombro estas 50,000.

Tria kategorio konsistas el tiuj, kiuj ne estas membroj de iu asocio aŭ klubo kaj ne abonas Esperanto-gazeton, sed uzas Esperanton okaze, kiam tio ŝajnas al ili utila. Ili havas en siaj libroŝrankoj lernolibrojn kaj aliajn Esperanto-librojn. Ili tamen malfermas ilin tre malofte. La nombro de tiuj "dormantaj" aŭ "duondormantaj" Esperantistoj estas granda, eble duon-miliono. Oni povas bedaŭri, ke ili ne estas aktivaj, sed oni ne povas nei, ke ili ekzistas kaj formas pasivan, sed ne tute senvaloran rezervan armeon.

Fine ekzistas tiuj personoj, milionoj da ili, eble multaj milionoj, kiuj iam lernis aŭ komencis lerni Esperanton, sed perdis intereson kaj forgesis preskaŭ ĉion. Nur en esceptaj cirkonstancoj Esperanto estos utila al ili. Se iu el ili retrovas sian intereson pri la lingvo kaj movado, la klopodo, kiun li devas fari por lerni Esperanton, tamen estos malpli granda ol la klopodo de persono, kiu komencas la studon sen antaŭa scio.

Ekzamenante la problemon de neologismoj de la vidpunkto de tiuj kvar kategorioj, ni vidas, ke nur la anoj de la unua kategorio regule havas kontakton kun novaj radikoj enkondukataj en la lingvon kaj povas permesi al si iomete kompetentan juĝon pri ilia dezirindeco aŭ nedezirindeco. Nur parto de la dua kategorio estas en la sama situacio. Personoj, kiuj legas "Brazilan Esperantiston" aŭ "Francan Esperantiston", sed neniu alian Esperanto-gazeton, scias nenion pri lingvaj studoj en "Esperanto" de UEA aŭ pri neologismoj uzataj en "Heroldo". Anoj de la tria kategorio eble nur rememoras tion, kion ili lernis en lernolibro publikigita en 1912. Ili neniam aŭdis pri la prefikso *mis-*, la sufikso *-end-* aŭ vortoj kiaj *varo*, *grego* kaj *inundi*. Esperanto estas por ili simila al la latina lingvo, kiun kelkaj el ili iam studis, sed ne al la gepatra lingvo, kiun ili parolas ĉiutage.

Se ni sukcesos multe pligrandigi ne nur la nombron de tiuj, kiuj lernas Esperanton, sed eĉ pli la nombron de la konstantaj uzantoj, la situacio aliĝos. Kiam gravaj komercaj firmoj, sciencaj organizoj, internaciaj kongresoj ktp. grandskale uzos Esperanton, kiam la scio de la lingvo prezentos pli grandan praktikan, eĉ finanĉan profiton, tiam Esperanto rapide fariĝos vivanta lingvo de centmiloj da personoj. Tiam fariĝos necese, ke la Akademio laboru pli multe kaj pli rapide, ke ĝi oficialigu novajn vortojn, prefiksojn kaj sufiksojn por kontentigi konstante ŝanĝiĝantajn bezonojn kaj ke ĝi starigu efikan kaj kompetentan organizon por gvidi kaj observi projektojn pri fakaj vortaroj.

Ĝis tiu tempo, laŭ mia opinio, la Akademio devos resti precipe garantianta kaj defendanta de la Fundamento. Ĝi oficialigos nur tiujn radikojn, kiuj estas nepre necesaj por esprimi novajn aspektojn de la moderna vivo, kaj ĝi daŭre admonos la neologismemulojn, ke ili uzu sian energion kaj sian talenton por pliperfektigi en la Zamenhofa Esperanto, anstataŭ proponi fantazie elpensitajn novajn radikojn "nepre akceptendajn".

## KONGRESO EN KALIFORNIO

**E** la tria fojo en sia 47-jara historio, la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko organizis kongreson en Kalifornio. En 1915 la kongreso okazis en San Francisco (kune kun la 11-a Universala Kongreso de Esperanto), en 1928 en Los Angeles. De la 27a al la 30a de Junio 1952 ni kunvenis en Sacramento, ĉefurbo de la Ora Ŝtato.

Kongresanoj venis ne nur el ĉiuj partoj de Kalifornio, sed ankaŭ el la "malproksima oriento", el la ŝtatoj Iowa, North Dakota, Virginia, Delaware kaj New York. Eksterlanda gasto estis *S-ino Patricia De Cleene* el Nov-Zelando, kiu jam de du jaroj vojaĝas ĉirkaŭ la mondon, ofte "per la dikfingro", kunveturante en preterpasantaj aŭtomobiloj. Ŝi jam vizitis sufiĉe grandan nombron da internaciaj, naciaj kaj regionaj Esperanto-kongresoj. Ŝia parolado dum la bankedo en Sacramento estis interesa kaj sprita. Tio estis vera, kvankam ĝi sekvis la majstran paroladon de alia preskaŭ "klasika" mondvojaĝanto de la Esperanto-movado, *S-ro Joseph R. Scherer* el Los Angeles, estinta Prezidanto de EANA kaj membro de Akademio de Esperanto.

S-ro Scherer estas bone konata kiel aŭtoro de la libroj *Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo* (en kiu li priskribas 18-monatan mondvojaĝon) kaj *Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo* (en kiu li rakontas unujaran vivadon en "trailer" aŭ "ruliĝanta hejmo"). Kompreneble li venis al Sacramento en "ruliĝanta hejmo" kun sia edzino kaj siaj du ĉarmaj filinetoj.

La sukceso de la kongreso estas ŝuldata grandparte al *Senatano H. E. Dillinger*, Prezidanto de la Esperanto-Klubo de Sacramento, kaj al la estraro kaj membroj de la klubo. La Senatano estis nelacigebla, helpante la kongreson kaj la gekongresanojn ĉiumaniere. Neniu baldaŭ



forĝos la belan ekskurson al Coloma, kie en 1849 James Marshall trovis la oron, kiu allogis centmilojn da orserĉantoj al Kalifornio, tiamaniere komencante la fluon de enmigrintoj, kiu ankoraŭ ne ĉesis, kaj faris el sovaĝa, malmulte kulturita lando unu el la plej gravaj kaj homriĉaj ŝtatoj de Usono. Coloma estas en la senata distrikto de S-ro Dillinger, kiu klarigis al la kongresanoj la multajn vidindaĵojn. Bedaŭrinde nia kasisto de EANA ne ĉeestis, kaj neniu el ni trovis oron en Coloma por daŭre solvi la financajn problemojn de la Esperanto-movado. Senatano Dillinger ankaŭ

montris al ni sian belan hejmurbon Placerville, antaŭe nomitan "Hangtown", ĉar oni tie pendigis banditojn kaj trompulojn, sufiĉe multnombrajn en la frua historio de la kalifornia orregiono.

Jam antaŭ la Interkonatiĝa Vespero okazis 15-minuta radio-programo sub gvido de la fama radio-programestro S-ro Ickes (parenco de la mortinta Usona Sekretario de Internaj Aferoj, Harold Ickes). Senatano Dillinger, Doktoro Solzbacher kaj Sinjorino Connor respondis multajn demandojn pri Esperanto kaj EANA.

En la Malferma Kunsido, kiun prezidis Senatano Dillinger, paroladis la Urbestro de Sacramento, *S-ro Leslie Wood*, kaj la Meksika Konsulo,

*D-ro Eliud Garcia Trevino*, kiu informiĝis pri Esperanto, kiam li studis medicinon en kursoj de la fama meksika kuracisto kaj Esperanto-pioniro *D-ro Ambrosio Vargas*. La Ĝenerala Konsulo de Kanado en San Francisco sendis salutleteron al la EANA-Kongreso.

La aferkunsidojn prezidis *D-ro William Solzbacher*, Prezidanto de la Asocio. Ekstraktoj el la raportoj de la Prezidanto, de la Ĝenerala Sekretario, de la Kasisto kaj Kaskontrolanto, de la Propaganda Komitato ktp., la membroj de EANA jam ricevis en speciala, detala kongresraporto. Ĉi tie mi nur diru, ke EANA nun havas proksimume 800 membrojn, kaj ke en la pasinta jaro enspezoj kaj elspezoj estis proksimume 8,000 dolaroj. La situacio de la Asocio estas ĉiurilate solida kaj firma. Multaj kongresanoj esprimis sian dankon pro tio al la Ĝenerala Sekretario, *G. Alan Connor*, al la Helpa Sekretariino, *Doris T. Connor*, kaj al iliaj helpantoj, al la estro de la Propaganda Komitato, *S-ro Harold S. Sloan*, kaj al la membroj de la Estraro.

En Sacramento oni ankaŭ diskutis pri diversaj atakoj kaj kritikoj de membroj kaj nemembroj kontraŭ la Estraro kaj la Centra Oficejo. Kelkajn el la kritikoj prezentis *S-ro Gilbert Nickel*, kiu estis Estrarano ĝis la lastaj elektoj. La Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario prezentis faktajn informojn pri la diversaj problemoj. La tuta kongresano forte malaprobis la planon de kelkaj skismemuloj fondi novan Esperanto-organizon por kontraŭbatali EANA. Dum la Kongreso oni aranĝis specialan kunvenon por doni al ĉiuj, eĉ nemembroj de EANA, okazon por prezenti kritikajn rimarkojn kaj fari demandojn pri iuj ajn aferoj, kiujn ili ne komprenas aŭ ne aprobas. Sciante, ke la antaŭan tagon la kongresanoj montris sian plenan lojalecon al EANA kaj ĝiaj demokrate elektitaj Estraranoj, neniu el la kritikemuloj venis al tiu kunsido.

Post la nunjaraj elektoj la Estraro de EANA konsistas el: *D-ro William Solzbacher*, Prezidanto; *Profesoro John Brewer*, Vicprezidanto; *George Alan Connor*, Ĝenerala Sekretario; *Harry Harrison*, Kasisto; *W. D. B. Hackett*, *Eulalia Marks*, *Adeline Vigelis*, Asociaj Direktoroj.

En publika kunveno sub prezido de Senatano *Dillinger*, *D-ro Solzbacher* prelegis pri la lingva problemo en internaciaj organizoj kaj kongresoj, akcentante la neceson de Esperanto. *S-ino Connor* prezentis impresan provlecion laŭ la Cseh-metodo kaj respondis al multaj demandoj pri la metodo. Fine la ĉarma 15-jara *Lilio Chomette*, el la mondkonata Esperantista familio *Chomette* el Los Angeles, diris kelkajn vortojn en sia "gepatra lingvo".

Multaj raportoj pri la EANA-Kongreso aperis en la loka kaj nacia gazetaro, altirante atenton al Esperanto kaj al nia Asocio. Tia informo aperis ekz. en *New York Times* (dimanĉa eldono de la 29a de Junio). Ankaŭ fremdlingvaj ĵurnaloj raportis. La ukrainlingva ĉiutaga ĵurnalo *Ameryka* (Philadelphia) publikigis longan artikolon sur sia unua paĝo, la germanlingva *Staats-Zeitung* (New York) eĉ pli longan artikolon sur sia dua paĝo. La du ĉiutagaj ĵurnaloj de Sacramento, *Bee* kaj *Union*, raportis ĉiutage antaŭ kaj dum la kongreso.

— *Babi le Mulo*

---

THE NEW ESPERANTO PHONOGRAPH DISK is given FREE with all renewals of membership in EANA in the Active Category at \$5. (Add 25¢ for postage.) Have you sent in your renewal yet? Do it now!



## ESPERANTO-KRONIKO

**Rand School of Social Science**, konata socialista lernejo en New York (7 East 15th St.), anoncas kurson de Esperanto en sia instruplano por 1952. La kurso, sub la gvido de *Mark Starr*, komenciĝos la 8-an de Oktobro, kaj kostos \$5 por serio de 8 lecionoj.

**F-ino Princess O. Jones**, Kansas City, skribis lastatempe: "Malrapide, sed sukcese mi laboras por nia lingva afero. Antaŭ kelkaj semajnoj kunvenis en mia hejmo malgranda Literatura Klubo. Mi prezentis mallongan paroladon pri la Esperanto-movado, kaj poste, ĉiu membro laŭlegis artikoleon pri Esperanto, elektitan el la *AE*".

**En la ukrainlingvan gazeton "Ameryka"**, S-ro *J. Trytiak*, Philadelphia, jam metis tri artikolojn pri Esperanto. Li ankaŭ anoncis kurson, kiu komenciĝos aŭtune.

**En la "Toronto Star"** aperis bonega letero pri Esperanto. La skribinto estis *W. D. B. Hackett*, estrarano de EANA kaj Sekretario de la Esperanto-Klubo de Toronto.

**Howard H. Lawrence** aranĝis montradon de Esperanto en granda ekspozicio de flankokupoj, kiun organizis la Rotaria Klubo de Bryan, Ohio. Vizitis la ekspozicion kvin ĝis ses mil personoj. S-ro Lawrence ĉeestis du vesperojn, kaj respondis demandojn pri Esperanto. La baza materialo en la Esperanto-budo estis la "vojaĝanta ekspozicio" de EANA.

**Pastro Fabian Sexton** informis nin, ke li instruas Esperanton al grupo de ok geknaboj en Cottonwood, Idaho.

**La fama meznokta radio-programo "Hawthorne"** de stacio KNX, Kalifornio, prezentis 15-minutan intervjuon pri Esperanto. Parolis *Joseph R. Scherer* kaj *Ted Stewart* el Los Angeles. S-ro Stewart ankaŭ donis al la estro de la programo la novan Esperanto-diskon por estonta uzado. Ni rekomendas al aliaj membroj fari same.

**En la "High Springs Herald"**, semajna gazeto en Florido, aperis trafo artikolo pri Esperanto, skribita de redaktoro *E. G. Cann*. S-ro Cann estas la bofilo de nia konata pioniro de Esperanto, *S-ino Flora Wyman*.

**Joseph Tamborra**, dum 25 jaroj profesoro en la Universitato de Nord-Dakoto, informis nin, ke li emeritiĝis de sia laboro. En Julio li vojaĝis al sia naskiĝlando Italujo, kaj intencas loĝi tie depost nun.

**El Koreo** raportis soldato *E. C. Lacy* jene: "Kvankam mi nun batalas en Koreo, mi kontaktiĝis kun Esperanto en Japanujo. Mia divizio manovris tie kontraŭ la taktika grupo "Aggressor", kiu kiel eble plej multe imitas eblan malamikon. "Aggressor" do, devas uzi ne-anglan lingvon (ekz. por alkitimigi oficirojn en la demandado de milit-kaptitoj pere de interpretistoj), sed tia lingvo ne povas esti tiu de iu tiel-nomata 'amika potenco'. Tial "Aggressor" utiligas la vere neŭtralan lingvon (la modernan neŭtralan lingvon kun vortaro de la 20-a jarcento): *Esperanto*. En la gvidlibro de "Aggressor" troviĝas la jenaj vortoj: '*Oni trovis, ke Esperanto povas plene esprimi la militajn esprimojn de la Usona armeo*'."



## DEZIRAS KORESPONDI

*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

- Anglujo.** Davis S. Levy, 36 Green Dragon Lane, Winchmore Hill, London, N. 21. 20-jara oficisto; dez. kor. pri muziko, lingvoj, literaturo, religio, mitologio, filozofio.
- Belgujo.** S-ro Pierre Notaerts, Lot (prov. Brabant). 32-jara oficisto en Bruselo, korespondante jam kun pli ol 50 diversaj landoj, komprenante DEFIRS, Esperanton kaj aliajn internaciajn lingvojn, deziras ankoraŭ pli da korespondantoj tutmonde, pri lingvoj, libroj, revuoj, kutimoj, artoj, astronomio, arkitekturo; interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn precipe kun Usono, Kanado, Meksiko, Sudameriko kaj Afriko. Certe respondos. Ne interesiĝas pri PM, sed al interesuloj sendos du adresojn de Belgaj kolektantoj kontraŭ 1 int. resp. kuponon.
- Brazilo.** Andrade Servulo, Rua Domingos Bastos, 220, Encruzilhada Recife (Pernambuco). Deziras korespondi.
- Germanujo.** Esperanto-Grupo PROSPERO, Hambacherstr. 66, (22b) Neustadt/Weinstrasse. Dez. kor., iŝ. il. PK.
- Japanujo.** Esperanta Koresponda Klubo, Oka (Hirakata City), Osaka. 1000 japanaj geklubanoj dez. kor. kun la tuta mondo kaj iŝ. PM, PK, gazetojn. Nepre respondos.
- Japanujo.** Yosiko Isida, 2-tyome, Kiriisi-tyo, Oogaki-si, Gihu-ken. 21-jara fraŭlino dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj en Usono.
- Kanado.** Paŭlo LaBelle, Box 204, Blenheim, Ont. Dez. kor. Esperante, angle, france, germane, nederlande kun diversaj landoj; iŝ. PM. kaj PK. Respondo certa.
- Japanujo.** S-ro Gjofuŭ Hiebatake, 260 Cukuda, Aomori. 69-jara kredanto de Ŝintoo, dez. kor. kun maljunaj gereligiuloj pri religiaj temoj.
- Germanujo.** S-ro Walther Gieseler, Forstweg 79, Berlin Frohnau. Deziras korespondi kun Usonanoj. Certe respondos.
- Japanujo.** Esperanto-Grupo, c/o F-ino Toyoko Tsutsumi, 1-53 Sansōdōri, Hukuoka. Grupo de junaj fraŭlinoj, 18-jaraj, deziras korespondi.

---

### Kiamaniere Oni Misuzas Delegitojn

Esti Delegito ofte estas malfacila, ĝena kaj ofte peto estas neplenumebla. Ekzemple: Germana Esperantisto skribis al mi, dirante ke dum la milito li perdis sian poŝhorloĝon, kaj li petis de mi, ke mi sendu al li *oran* bonkvalitan poŝhorloĝon. Alia petanto de Rumanujo skribis, ke li bezonas 120 gramojn da streptomicino. Unue, tiu drogo ne estas de mi aĉetebla, kaj estas malpermesite forsendi ĝin el ĉi tiu lando precipe al komunist-kontrolita lando. Li povus riĉiĝi dum la nokto se li vendus ĝin en la "nigra merkato". Virino el Hungarujo petis, ke mi sendu al ŝi 1600 metrojn da "nylon"-ŝnureto, taŭga por fiŝkaptado. (Ŝia frato estas komerca fiŝkaptisto.) Pro tio, ke delegito ricevas tiajn leterojn, la ofico ne estas agrabla, ĉar tiaj petoj estas nepleumeblaj. —*Delegito en Miĉigano*

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

*The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.*

<i>PRACTICAL ESPERANTO</i> , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$ .25
<i>REED'S PRACTICAL GRAMMAR</i> , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
<i>ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE</i> , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
<i>UNIVERSALA ESPERANTO-METODO</i> , Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....	Cloth 6.00
<i>ESPERANTO GRAMMAR &amp; COMMENTARY</i> , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 1.50
<i>ESPERANTO (World Language Series)</i> , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
<i>WORLD'S CHIEF LANGUAGES</i> , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
<i>AMERICAN POCKET DICTIONARY</i> , Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp.....	.25
<i>EDINBURGH DICTIONARY</i> . Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
<i>MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY</i> . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
<i>FULCHER &amp; LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY</i> . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
<i>PLENA VORTARO DE ESPERANTO</i> , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....	Cloth 4.00
<i>Rare</i> , exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....	Cloth 6.50
<i>FUNDAMENTA KRESTOMATIO</i> , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.65
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....	Half-Cloth 2.50
<i>KARLO</i> , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
<i>THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)</i> . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
<i>ESPERANTO SORTIMENTO</i> . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Argenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Mizerere</i> , music story, & <i>Tbais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
<i>RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS</i> , Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
<i>INDIAN BEAD STAR</i> . Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
<i>GREEN STAR PENDANT</i> . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia...	.75
<i>ENAMEL GREEN STAR</i> . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

**Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.**

## NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

**FOR INDIVIDUAL STUDY:** The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

**FOR GROUP STUDY:** Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**